

TREZORO
LA ESPERANTA NOVELARTO 1887-1986
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 91-002-A-1, 1990.12.08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

A.- Pri la duvoluma verko **TREZORO** aŭ **LA ESPERANTA NOVELARTO 1887-1986** ni nepre raportu dum la decembra monato, la periodo de aĉeto de libroj.

Cl.- Jes, ĉar tiu antologio devus troviĝi en ĉiu esperanto-libraro, seeble apud la jam delonge elĉerpita libro **33 RAKONTOJ** ankaŭ subtitolita **LA ESPERANTA NOVELARTO**.

A.- Ambaŭ verkojn redaktis Reto ROSSETTI, kun Ferenc SZILÁGYI por **33 RAKONTOJ**, kaj kun Henri VATRÉ por **TREZORO**.

Cl.- Se la unua verko intimigis nin kun la stilo de 31 verkistoj, la dua prezentas al ni novelojn aŭ fragmentojn prozajn de ekzakte 100 aŭtoroj. Tiu tre signifa diferenco en la nombro de la elektitaj aŭtoroj igas nin reagi tre malsimile al ambaŭ antologioj. Kun **33 RAKONTOJ** ni frekventas renomajn prozistojn, kies plej multaj nomoj estas al ni bone konataj. Ni kvazaŭ kunvenas kun ili en privilegia etoso, kiel se ni partoprenas etan kongreson. Sed kun **TREZORO** ni fakte partoprenas Universalan Kongreson, kie ni renkontas konatojn kun renovigita ĝojo kaj ekfrekventas multajn aliajn homojn, kies nomojn ni ofte baldaŭ forgesos. Nur kelkaj el tiuj renkontitoj iĝos por ni novkonatoj. Tial la **biografietoj**, kiuj konkludas la duan volumon de **Trezoro** akiras gravecon, kiel en kongresa libro la listo de la partoprenantoj. Ili helpas al ni ekscii, kun kiuj ni lege rilatas.

A.- Ĉu tiu altiĝo de la nombro de la elektitaj aŭtoroj respegulas kreskon de la esperanto-prozistoj?

Cl.- Parte jes. Inter 1964, la aperdato de **33 rakontoj** kaj 1989, tiu de **Trezoro**, estas distanco de 25 jaroj, do de la kvarono de la vivdaŭro de esperanto, de tuta generacio. Kaj dum tiu lasta kvaronjarcento sin anoncis multaj novaj aŭtoroj per tutcerte signifoplenaj verkoj. Sed Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ ne volis festi la centjaran jubileon de esperanto sen reatentigi nin pri verkistoj tipaj de antaŭaj generacioj, kiujn ni tendencas iom neglekti plej ofte, ĉar iliaj noveloj, romanoj aŭ eseoj estas delonge elĉerpitaj. ROSSETTI kaj VATRÉ pravis, kaj tio instigu eldonistojn redoni vivon al de longe elĉerpitaj libroj, ke ĉiuj povu ilin ekŝati, kaj ne nur la privilegiaj posedantoj de brokantaĵoj pli kaj pli raraj kaj kostaj.

A.- Ĉu ne iom similan fenomenon ni rimarkas kun la poetoj, kiam ni komparas la du eldonojn de **ESPERANTA ANTOLOGIO**. La dua eldono reviziita kaj kompletigita de 1984 konigas al ni multe pli da poetoj, ol la unua eldono de 1958.

Cl.- Jes, fakte. La redaktoro William AULD sentis la bezonon honorigi multajn novajn talentojn. Li tion faris kun multe malpli striktaj kriterioj, ol en la unua antologio, kiun pro tio preferas la poeziemuloj. Koncerne al la prozistoj mi ne pensas, ke ni troviĝas antaŭ simila situacio. La kriterio mem de la elekto videble ŝanĝiĝis. Antaŭ ĉio **33 rakontoj** estas novelaro. En **Trezoro** kolektiĝis ne nur noveloj, sed ankaŭ prozaj fragmentoj diversspecaj. La unua teksto estas ekzemple dupaĝa fragmento de antaŭparolo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu

aperas sub la titolo **Ludoviko Lazaro Zamenhof parolas pri sia lingvo**. Do tute ne temas pri novelo, sed pri specimeno de la proza stilo de la aŭtoro de Esperanto. Kaj ni tuj diras, ke ni tre bedaŭras, ke tiajn fragmentojn ne sekvas minimuma bibliografia noto, kiu diras, el kiu verko la citaĵo estas eltirita. Tiu manko multe senvalorigas tiun antologion.

A.- Do oni fakte ne scias, ĉu oni troviĝas antaŭ vera novelo, aŭ antaŭ fragmento el romano aŭ el alispeca verko.

Cl.- Jes, kaj tio en si mem ne estus malbona, se la titolo de la verko ne kredigus pri antologio de la **esperanta novelarto**. Ni troviĝas antaŭ antologio de prozaj fragmentoj pli aŭ malpli longaj, kiujn la redaktoroj proponas al nia atento. Kelkaj jam troviĝis en **33 rakontoj**, kiel ekzemple **Alpa rozo** de Magnus Nordensvan. La sola signifa diferenco estas, ke ekzemple en **33 rakontoj** oni scias, ke la koncerna teksto aperis en la revuo **L'Espérantiste**, dum tiu informo mankas en **Trezoro**. Tiel estas por ĉiuj noveloj en **33 rakontoj**, oni ĉiam povas trovi, el kiu revuo aŭ libro ili fontas. Komparante tiurilate ambaŭ antologiojn mi rimarkis, ke aŭtoro kiel **Roksano** aŭ **Jeanne FLOURENS** reprezentita en **33 rakontoj** pere de la 24-paĝa novelo **Doktoro Nekelmo** ĉerpita el **Ondo de Esperanto** ne plu estas menciita en **Trezoro**.

A.- Reto ROSSETTI kaj Henri VATRÉ verŝajne juĝis, ke tiu longa prozaĵo ne havas tre grandan beletran valoron.

Cl.- Kaj laŭ mi ili ne malpravus. Siatempe mi min demandis, kial tiu prozaĵo tipa je la pionira periodo ŝajnis tiel valora, dum ekzemple mankis la novelo **Tamen perdota** de Edmond Privat, kiu estas beletra juvelo inspirinta multajn esperanto-verkistojn, inter kiuj sin listigas Julio BAGHY.

A.- Refoje mankas Edmond PRIVAT en **Trezoro**, ĉu ne !

Cl.- Jes, kaj tion mi ree bedaŭras. Sed pri la elekto-kriterioj de redaktoroj estas malfacile diskuti. Nur subjektivaj ili povas esti. Se la koncerna antologio havus celon precizigitan, ni povus esprimi juĝon. **Trezoro** ne estas reala enkonduko al laŭtempa analizo de la disvolviĝo de la proza stilo en esperanto. Tial ĝi ne estos tre helpa por la instruado de la esperanto-literaturo. Jen kiel Henri VATRÉ diferencigas ambaŭ antologiojn. Pri **33 rakontoj** li skribas:

A.- "Kunigante en volumo faskon da prozaĵoj ĉerpitaj el plej diversaj fontoj, ni deziris plenumi servon laŭ plurobla celo: Unue, savi el forgeso kelkajn validajn atestojn; due, proponi interesan legaĵon al la ĝenerala publiko; trie, ebligi al studentoj oportunan komparon pri evoluo de niaj esprim-rimedo en specifa kategorio de prozo."

Cl.- Tiu resumo ankaŭ konvenas al la nova antologio **Trezoro**. Sed pri ĝi Henri VATRÉ aldonas:

A.- "Ni nun prezentas verkon pli instrumentan, ol monumentan, ĉar, fakte, ne temas pri "antologio de elektitaj pecoj", sed pli ĝuste pri kolekto da ekzemploj, da specimenoj. Nian preferon gvidis la lingva nivelo, la originaleco de la temo kaj la imaga aŭ observa kapablo de la aŭtoro."

Cl.- Leginte tion, ni ree ne komprenas la foreston de **Tamen perdota**, kies lingva nivelo, originaleco kaj priskriba elvokivo superas multajn proponitajn prozaĵojn. Sed tiu forgeso estas ŝuldita tre verŝajne al la elĉerpiĝo de la noveloj de Edmond Privat. Kaj tio ne malhelpu nin ĝue legi la proponitajn prozaĵojn. Per tiu tralego ni retrovu amikojn kaj malkovru aŭtorojn legindajn.

A.- Ni kontribuos al tiu malkovro la venontajn semajnojn per laŭtego de kelkaj el la rakontoj kolektitaj en **Trezoro**, verko, kies aĉeton ni vigle konsilas al ĉiuj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi, ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012*